

STARTO

N-ro 2/2010 (235)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Sabla Printempo (9.-11.4.2010 en Písek)
instruis fari „miraklojn“ per fotoj

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-
Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615
651, cea@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu
linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč
por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo.
Duobla reklamo 15% rabato, trifoja
reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj
duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200
Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola,
enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč ko-
mencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj:
Jana Melichárková, Polní 938, 696 02
Ratiškovice, melicharkova8@seznam.
cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří
Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42
Vracov, tel. 518 628 155,
anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana,
blindula, medicina, fervojista, pri
informadiko

Komisiono de ĈEA: pedagogia

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538,
738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova
@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Jana Melichárková, Polní
938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@
seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kun-
ordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA):
Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobří-
chovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-
pech.cz (internaciaj rilatoj, fakaj aplikoj de
Esperanto, ĈEA-retkomunikoj, eldona aga-
do)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše
3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611
584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo,
konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615
651, cea.polnický@quick.cz (protokolado,
korespondado, rilatoj kun la banko)

Kasistino: Libuše Hýblová, Bohutín 136,
789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
774 928 974 (membrobazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Grego-
rova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424,
pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projek-
toj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto:
Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625
00 Brno, tel. 547 240 690, malovec
@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-
perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo
nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828,
Lucie.Karesova@seznam.cz

Kontrolgrupo de ĈEA:

Prezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní
2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257,
dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04
Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00
Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer
domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy,
direktorino: Blanka Čuhelová, tel. 461 532
704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, Pavel Polnic-
ký, Vratislav Hirš.

La mondo 2010-2020

Sur la kampo de lingvoj kaj literaturo ni povas atendi, ke la sekva jardeko estos dediĉita al konstruado de oficialaj virtualaj bibliotekoj en la interreto. Tiuj devus disponigi milionojn da libroj en ĉiuj kulturlingvoj por studado kaj esplorado, ankaŭ gazetojn, bildojn, filmojn, gigantan kvanton da diversaj informoj. En la kaoson, kiu nun regas en la reto, ili devas enkonduki ordon kaj sistemecon. La ĝisnunaj projektoj (Gutenberg, Gallica, Europeana) eksperimentis, serĉis la vojon, sed nun verŝajne realiĝos la celkonscia konstruado. Spronos ĝin ankaŭ enmerkato de legiloj kun „elektronika papero“ anstataŭ lumanta ekrano.

UEA en la sekva jardeko

UEA intencas proponi al Unesko proklami Jardekon de Lingvoj, por levi la konscion de la publiko pri la graveco de lingvoj kaj de komunikado kaj por klarigi, kiel tiun konscion povas fortigi ankaŭ Esperanto.

Projekto Vizaĝoj celos diskonigi en la publiko la plej gravajn vizaĝojn de nia movado por montri, ke ankaŭ Esperanto havas fierindajn grandulojn. Ekz. vikipediajn artikolojn oni povas traduki al naciaj lingvoj.

Speciala komisiono mastrumos la produktadon kaj ĝisdatigadon de profesinivelaj informmaterialoj pri Esperanto kaj ĝia movado, transdoneblaj al ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesiĝantoj. Landaj asocioj prizorgos nacilingvajn versiojn.

UEA serĉos vojon kiel atingi, ke la interret-perantoj disponigu por Esperanto la samajn teknikajn rimedojn de aŭtomata tradukado kaj lingva prezentado kiel por aliaj lingvoj.

Okaze de la Olimpiaj Ludoj de 2016 esperantistoj klopodos kunlabori kaj utiligi Esperanton.

Elstarigo de la plej bona landa retpaĝaro helpu al landaj asocioj plibonigisian retan prezentadon.

Retaj kursoj, lerno-akcelaj kaj paroligaj projektoj ricevu emfazon (lernu.net, edukado.net k.a.).

Subteninda estas la eldonado de nacilingvaj tradukoj de la originala Esperanto-literaturo.

Kulturaj festivaloj stimulu laboron de teatraj grupoj kaj kantistoj, prezentu ekspoziciojn de pentristoj kaj aliaj artistoj (ekz. dum UK) kaj prezentu filmetojn en la reto.

UEA kaj ILEI starigu programon de instruista trejnado „Instruapablo“ por helpi al provoj malfermi oficialajn universitatajn kursojn.

Nia movado moviĝu al sistemo, en kiu retaj membroj ludas pli grandan rolon (ekz. Lernu havas 14 000 membrojn).

ĈEA en la sekva jardeko

Proponi Esperanton al pensiuloj kiel rimedon por aktivigi la cerbon kaj riĉigi la vivon en la alta aĝo.

Organizi kursojn de laboro per komputilo por ligi klubojn per reta poŝto, instrui al ili prepari prezentadon de la klubo en la reto, ebligi kontribui al Vikipedio kaj utiligi por Esperanto ankaŭ aliajn elektronikajn rimedojn.

En la projekto Memoro kolekti informojn pri niaj aktivuloj (pasintaj kaj vivantaj) kaj ilia verko, pri gravaj okazaĵoj, objektoj, libroj, gazetoj ktp.

Por la projekto Vizaĝoj elekti kaj prezenti la plej gravajn personojn de la ĉeĥa E-movado kaj propagandi ilin en la publiko (ekz. en Vikipedio).

En Esperanta Vikipedio prezenti ĉeĥajn urbojn, vilaĝojn, memoraĵojn, instituciojn, arton, sciencan, sporton kaj fari tiel Esperanton utila por turistoj.

Helpi esperantigi ankaŭ oficialajn retejojn de urboj kaj vilaĝoj, se ili konsentos aŭ eĉ petos pri tio.

Kunlabori kun E@I pri la projekto Bretaro, kiu kolektos esperantlingvajn tekstojn en elektronika formo kaj liberajn publikigos en virtuala biblioteko.

Preparadi por nia Esperanto-Muzeo regule ekspoziciojn pri diversaj temoj. Helpi al kluboj prepari lokajn ekspoziciojn, se eble tiel, ke la paneloj aŭ materialoj estu prunteblaj al aliaj lokoj.

Prilabori kulturan heredaĵon, kiun postlasis la antaŭaj generacioj de esperantistoj. Multaj manuskriptoj kuŝas kaj putras en bananskatoloj, kvankam nun ekzistas rimedoj por ilin skani kaj disponigi por plua utiligo.

Zorgi pri aktualeco de niaj lerniloj, lernolibroj, vortaroj, korespondaj kaj retaj kursoj, legolibroj.

En la sekva jardeko emeritiĝos duonmiliono da homoj, kiuj ne plu timas komputilojn kaj kiuj serĉos en la reto, kiel riĉigi sian vivon. Estos grave prepari por tiu aĝo-grupo lernilojn kaj programojn, kiuj montros al ili, kiel povus ilin helpi Esperanto.

Miroslav Malovec

Rimarkigo: la prezentitaj tekstoj ne estas oficialaj laborplanoj, sed mi observis, kio estas reale farata, kion oni daŭrigos, eventuale kion ni povus fari, ĉar rimedoj ekzistas.

*

Ĉeĥa konferenco

Poděbrady 23.-25.4.2010

Ne temas pri nia asocia konferenco, kiu estos en oktobro, sed pri kunveno de ĉeĥaj intelektuloj, kiuj volas okupiĝi pri ideo, kion nia ĉeĥa socio bezonas kaj kion la kleruloj faru. Pasintjara slogano estis „Fatalo aŭ espero?“, la ĉi-jara „Kia vojo kaj kiamaniere pluen?“. Inter kvindek da prelegantoj estis ankaŭ nia d-ro Pavel Lehký, prezidanto de E-lingvo, kiu parolis pri problemoj de komunikado en Eŭropa Unio. Lia prelego estis tiel varme akceptita, ke oni metis ĝin en la retejon de la konferenco inter la 10 plej interesaj kontribuoj. Jen:

<http://www.ceska-konference.cz/>

La prelegojn vi trovos en la dekstra kolumno, sur la dua loko tiun de d-ro Lehký. La paroladon li dividis en kvar punktojn: *Politika situacio kaj kiel solvi ĝin? Energetika politiko, Signifo de la scienco por nia socio, Ĉeĥa komunika abismo.*

En la lasta li atentigas, ke EU elspezas ĉiujare 120 miliardojn da eŭroj por fremdlingva instruado kaj la lernantoj pasigas en ties lecionoj 10-34% da lernotempo malprofite al ceteraj studobjektoj. Trudata estas precipe la angla, kiun malgraŭ maksimumo da elspezitaj rimedoj ellernas nur minimumo da lernantoj, plie tia solvo estas maljusta. Li rekomendis neŭtralan, logikan kaj regulan lingvon, sed lasis al la aŭskultantoj, ke ili mem divenu, ke li parolas pri Esperanto.

Parolante pri energioj li rekomendis premitan aeron, kies kapabloj ne estas ĝenerale konataj.

-mm-

EK Česká Třebová

50 jaroj

17.-19.9.2010

Esperanto-rondeto „Amikeco“ invitas vin al solenaĵo kun jena programo:

17. 9. 2010 vendredo 16 h

M. Malovec (CZ): Historio de la internacia lingvo Esperanto kaj nuntempa stato de E-movado en la mondo

P. Chrdle (CZ): Rolo de Esperanto en la moderna mondo

J. Nieman (DK): Esperanto kaj fervojistoj

L. Kovář (CZ): Esperanto-rondeto „Amikeco“ Česká Třebová

H. Hoffmann (D): Aplikado de Esperanto en faka terminologio

18.9.2010 sabato 9.45 h

* Komuna renkontiĝo en la urboparko „Javorka“

* Solena malkovro de Esperanta memorŝtono, komuna fotado

* Tagmanĝo en restoracio „Na Horách“

* Mallonga promenado, vizito de kapeleto, rigardo de ekspozicio pri Esperanto

* Oficiala parolado pri Esperanta agado en Ĉ. Třebová dum 50 jaroj

* Honorigo de la fondintoj kaj eminentuloj

* Salutvortoj de la gastoj

* Rememoriga prezentaĵo

* Vespermanĝo laŭ propra volo, amika babilado, danco, riĉa tombolo

19.9.2010 dimanĉo 9 h

Komputila seminario pri Esperanto (strato Sadová, gvidas PhDr. P. Dvořáková) aŭ promeno tra la urbo
Limdato por aliĝo: 31.8.2010

Retadreso: jk.esperanto@seznam.cz

Poŝtelefono +420 721869054

Poŝtadreso: Jana Křížková, B.Martinů 957, 563 01 Lanškroun, CZ

Prezo inter 250 Kč (en kvarlita ĉambro) ĝis 750 Kč (en unulita) por unu nokto (aŭ 9,80 ĝis 29,30 eŭroj).

Kompleta aliĝilo en PDF:

<http://www.esperanto.cz/soubory/Ceska.Trebova.invitilo.pdf>

EKOTUR KAJ INPASEM NULIGITAJ

Kvankam pro malsamaj kialoj, mi devas anonci ke la ĉi-jaraj aranĝoj Ekotur (Ekoturisma renkontiĝo) en České Budějovice kaj InPaSem (Internacia Paroliga Semajno) en Dobřichovice devis esti nuligitaj. Tial bv. ne sendi aliĝilojn kaj precipe ne antaŭpagi la aranĝojn, ke la mono ne superflue estu ĝirata tien kaj reen kaj tiel nur bankoj estu nutrataj.

Memkomprene tiuj (feliĉe malmultaj), kiuj jam aliĝis al Ekotur, estas informitaj, kaj du, kiuj jam eĉ sendis la monon, ĝin ankaŭ rericevis.

Surbaze de la decido de francaj iniciatintoj de InPaSem (al kiuj mi estas danko por la regula transprenado de plejparto de fiksaĵoj, pro kiu la kotizo povis esti nur simbola) tiu tradicio finiĝas, kaj InPaSem ne plu ripetiĝos.

Ekotur-on, kiu ĉi-foje devis esti nuligita pro teknikaj kialoj, mi tamen planas denove okazigi en 2011, tre verŝajne en Bohemia Karsto. La dato ankoraŭ ne estas fiksita.

Petro Chrdle

Malování s Pavlem Rakem

12. června 2010

V Ottendorferově domě
Muzeum esperanta Svitavy

Vernisáž jeho výstavy
Autogramiáda
Křest nové učebnice esperanta
Začátek v 16:00 hodin



Pentrado kun Pavel Rak
la 12-an de junio 2010
en Ottendorfer-domo
Esperanto-Muzeo en Svitavy

Inaŭguro de lia ekspozicio
Aŭtografado
Bapto de nova lernolibro de Esperanto
Komenco je la 16-a horo

Esperanto-klubo „La Ponto“ invitas vin al

La IV-a POSTFERIA RENKONTIĜO

Dimanĉe la 5-an de septembro 2010 en
TÁBOR



Interaktiva vizito de la historia
urbocentro
kun E-ĉiĉerono, „urba ludo“
Tagmanĝo kun mallonga kleriga/kultura
programo
(E-aktualaĵoj, lingvaj kaprompaj
„nuksetoj“ pri historio, muziko)
Bierumado en mezepoka husana muelejo

Programo okazos inter ĉ. 10-16a horoj
Detaloj preparatas kaj estos senditaj al
aliĝintoj

La prezo estos kalkulita laŭ realaj
elspezoj
(manĝoj, enirpagoj, bazaj organizaj
kostoj)

Informoj: PhDr. Pavla Dvořáková,
Gregorova 2563, 397 01 Písek,
tel. 774 942424, retadreso
pisek@esperanto.cz

Germanoj kaj francoj kongresis komune

Dum ĉi-jaraj Pentekostoj okazis en Kaiserslautern komuna Nacia Franca kaj 87-a Germana Esperanto-kongreso. Mi ricevis sufiĉe da loko por prezeti ankaŭ iom de la ĉeĥa Esperanto-vivo. Malgraŭ tio, ke mian unuhoran programeron oni nomis „Novaj libroj, prezentataj de la eldonejo KAVA-PECH“, mi uzis la okazon kaj prezentis ankaŭ la Esperanto-muzeon en Svitavy kaj invitis la ĉeestantojn al Poděbrady pro la konferenco de ĈEA.

Ene de la kongreso, kiu havis tre riĉajn laboran, kulturen kaj turisman programojn, okazis ankaŭ Movada Foiro. Dum ĝi mi havis je dispono tablon por Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj KAVA-PECH, kio estis plua okazo por disdonadi la faldfoliojn pri nia Esperanto-muzeo kaj invitilojn por la ĈEA-konferenco. Francaj interesatoj enviis al la germanaj, ke ĝi ekzistas ankaŭ en la germana, tamen feliĉe mi havis por ili sufiĉe da tiuj skribitaj en Esperanto.



Sur la fotoj vi povas vidi prezidantaron de GEA dum la membrokunveno de GEA (parolas prezidanto d-ro Rudolf Fischer) kaj tablon de ĈEA dum la Movada Foiro. Najbaris tablo de OSIEK,

do sur la foto staranta apud mi estas ties prezidantino Anne Jausions.



La kongreson ĉeestis entute pli ol 250 partoprenantoj, surprize pli el Francio ol el Germanio, sed krome ankaŭ unuopuloj el aliaj landoj. La venonta germana kongreso kazos komune kun nederlandaj esperantistoj, por la jaro 2012 oni planas komunan kongreson kun poloj kaj ni jam antaŭparolis eblojn de eventuala komuna ĉeĥa-germana Esperanto-kongreso en 2013.

Petro Chrdle

Novaj akademianoj

Okazis en la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro la reelektado de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto.

Ne rekandidatis Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flavio Rebelo kaj Trevor Steele.

Iliajn lokojn prenis la novaj akademianoj Marcos Cramer, Lena Karpunina, Stano Marček, Paŭlo Moĵajev kaj Alexander Shlafer.

Pro la forpaso de akademiano Maŭro La Torre, nun la Akademio konsistas el 44 membroj.

laŭ RET-INFO

Novajoj el Esperanto-urbo

Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo

* Ĉe la GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo/Esperanto-Centro en Herzberg (ICH) post multjara persista, strebema laboro, ekestis unika Esperanto-biblioteko kun arkivejo. Al la biblioteko apartenas pli ol 7.000 libroj, pli ol 13.000 gazetoj, miloj da turismaj broŝuroj, pli ol 500 "sonportiloj", pli ol 250 filmoj (sur vidbendoj, kiel DVDj kaj KDj).

* Aparta "Esperanto-ekspozicio" kun ĉ. 40 tabuloj kun historiaj materialoj, nuntempaj varbiloj pri uzeblo, uzado de Esperanto, kulturo, muziko, literaturo ktp. pruntece estas je dispono por GEA-grupoj.

* La urbo Herzberg am Harz disponigos unikan informplatformon pri Esperanto kaj Esperanto-urbo (supra koridoro) en la kastela muzeo. Tion ni baldaŭ devos plani, financi, ktp., por ke ekestu tie konstanta, alloga varbilo. En nia fotogalerio (sube) vi trovas foton kun kelkaj partoprenantoj de la lasta studsesio (klerigmoduloj) dum la vizito de la muzeo.

* Krome la urbo disponigas 4 novajn salonojn en la muzeo por specialaj, porokazaj ekspozicioj. Nia propono pri Esperanto celas prezenti la sekvajn temojn: Esperanto kaj Mond-Literaturo, Esperanto kaj Turismo, Esperanto kaj Filatelo, ktp.

* Okaze de la 25-jara jubileo de la kastela muzeo okazis solena festo kun la ĉeesto de multaj gravuloj. S-ro urbestro Gerhard Walter denove publike emfazis la gravan rolon de Esperanto en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. Ĉeestis i.a. ankaŭ la Welf-princo Henriko de Hanovro kaj duko de Brunsvigo, ja la

kastelo estis la lulilo de la fama Welf-dinastio. La princo intencas doni financan subtenon, por ke la muzeo ekhavu multekostan modernan elektronikan gvidsistemon en la lingvoj germana, angla kaj Esperanto.

* ALVOKO: Interkultura Centro Herzberg (ICH) ofertas favorajn kondiĉojn al praktikanto resp. staĝanto por certa tempo (prefere por min. 1 monato aŭ pli longe) ekde aŭgusto 2010. Sinproponojn bv. sendi al ICH kun mallonga biografio, mencio de lingva nivelo, praktikaj kapabloj, celoj.

* ICH-gvidantoj Peter Zivar kaj Zsófía Korody prelegis ankaŭ dum la Franc-Germana Esperanto-Kongreso en Kaiserslautern. Bona sukceso estis tie la Movada Foiro: ĉe la informtablo de Interkultura Herzberg estis disdonitaj multaj informiloj, programboŝuroj kaj vendataj ŝatataj esperantaĵoj (ekz. insignoj, flagoj, KD-oj).

* Delegacio el Herzberg - la Esperanto-urbo partoprenis ĉe Beneluksa Esperanto-Kongreso en Antverpeno (Belgio) kaj prezentis la viglan Esperanto-vivon, la ĝisnunajn atingiĝojn.

* Esperanto-flagoj estas haveblaj en 4 diversaj grandecoj: a) eta flago (kun la vorto Esperanto) kun bastono (4 €); b) flageto 60 cm x 90 cm (6 €); c) flago 90 cm x 150 cm (9 €); d) flagego (por kongresoj, landaj asocioj, ktp.) 150 cm x 250 cm = (39,00 € (enkonduka prezo)

* Internacia OSIEK-Konferenco en Herzberg (17a - 23a de julio 2010), prelegontoj: Detlev Blanke, Josef Dörr, Michel Duc Goninaz, Ĵak Le Puil, Toon Witkam, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy. Detalojn, aliĝilon ĉe <http://esperanto-urbo.de>

Unika ZEO sub la maro!

La plej okcidenta parto de duon-insulo Krimeo - duoninsulo Tarhankut - estas unika loko de belegaj golfetoj, kie la fundo estas travidebla je 12 metroj. Tie estas subakva muzeo. Komence de la „rekonstrua periodo“ en Sovetunio oni ofte forĵetadis bustojn de bolŝevikoj. Subakvistoj aranĝis tie en la maro „aleon de bolŝevikoj“, poste aleon de eminentaj personoj kaj rezulte aperis unika subakva muzeo.

En la jaro 2008 ĝuste apud tiu loko okazis ukraina-rusia E-renkontiĝo IET-1 (Internaciaj Esperantaj Tagnoktoj), kiun partoprenis ĉ. 180 esperantistoj. Dum la renkontiĝo la partoprenantoj solene inaŭguris Esperanto-Aleon, en kiu la unuaj bustoj estis tiu de Zamenhof kaj fama blinda esperantisto, vojaĝanto, verkisto Vasilij Eroŝenko. La 20-kilogramajn 45-centimetrajn bustojn kreis konata skulptisto Sergej Fjodorov.

Ĉi-jare komence de julio en la sama loko okazos IET-2, dum kiu en la Esperanto-aleo aperos tria busto - de fama Esperanto-pioniro, svedo Valdemar Langlet: unua E-vojaĝanto, unua prezidanto de Sveda E-Federacio, redaktoro de la dua E-gazeto „Lingvo Internacia“, fondinto de dua en la mondo E-klubo kaj... unua internacia esperantista geedziĝo. Ne preterlasu eblecon partopreni IET-2. Pliaj informojn dezirantoj povas trovi ĉe <http://esperanto.net/iet2010/>

*Jefim Zajdman
laŭ RET-INFO*

Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz

En Bydgoszcz, Pollando, dum 17 – 25. 04. 2010 okazis tradiciaj Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz kun AKB-Sesio de AIS-klerigejo. Oni prelegis pri Internacia Esperanto-Turismo, pri vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo, pri turismo en Bulgario, pri instruado de Esperanto por vojaĝgvidantoj kaj estis prezentitaj filmoj de red. Roman Dobrzynski pri Esperanto-instruado kaj turismo.

Esperanto-tradukiloj

Apertium estas traduk-platfomo, per kiu oni evoluigas aŭtomatajn tradukilojn el kaj al Esperanto, i.a. tiuj de <http://traduku.net/>.

La antaŭviditaj projektoj en Apertium apartenas al du kategorioj: ĉefe programadaj aŭ ĉefe lingvistikaj.

En la lingvistikaj oni aldonas novajn lingvoparojn al la tradukplatfomo. Nuntempe ekzistas en Apertium 22 tradukiloj inter lingvoparoj konsiderataj “stabilaj” kaj pliaj en diversaj gradoj de evoluigo. El tiuj 22, tri havas Esperanton kiel unu el la du traduklingvoj: la tradukiloj el la kataluna, la hispana kaj la angla (ĉi-lasta ankaŭ en la inversa direkto). Ankoraŭ ne atingis “stabilan” nivelon tradukilo el la franca al Esperanto.

En la programadaj oni evoluigas kaj plibonigas la platformon Apertium aŭ adaptas ĝin por diverscela uzado (ekz. kiel oni faris por faciligi ĝian uzadon por traduki Vikipediajn artikolojn).

<http://www.apertium.org/?lang=eo>

laŭ Jacob Nordfalk

EL NIA TREZOREJO

Niaj pioniraj esperantistoj, ofte ne plu konataj, postlasis valorajn tekstojn, kiujn ni ne devus forgesi. Ni gustumu unu el la tradukoj de 1911 en Bohema Esperantisto.

Hundo en la ĉielo

Verkis Jiří Mahen.

El la bohema lingvo tradukis Jan Havran.

Ili staris ĉiu ĉirkaŭ li kaj ne kuraĝadis jam eĉ ekparoli. Maljuna patro, multmema direktanto de la vivo, estis malĝojigita plej multe. Kiam li intervale kliniĝadis super la fileton, li ŝajnis rigardi ien, kie jam nek la suno brilas, nek floroj floras, nek birdo kantas, en la promesitan landon, kie la piedo de l' homo silente metiĝas kaj stariĝas por ĉiam. Ankaŭ la patrino havis preskaŭ la saman rigardon. Sed en siaj okuloj tremis la plej terurega plendo pro io, kio estas por ĉiam for, detruita kaj perdita.

– Silenton! – diris iu molvoĉe. Kaj ĉiuj anguloj kaj ĉiu linieto sur blanka plafono ripetis tion en lingvo, kiun oni ne aŭdas, sed kiun oni en tiaj momentoj ne povas ne kompreni: Silenton! Silenton!

– Frato, frateto mia! – sonas tio kiel eĥo en fratina brusto. –

Paŭlo! – sonas tio en frata kapo kiel surda ekkrio.

La plej malgranda el infanoj timeme jam dudek fojojn frotetas anson de pordo. Okuloj estas larĝe malfermitaj, kaj maldekstra mano tenas sur brusto ruleton ĉirkaŭvolvitan en ĉifono.

– Dudek kvin jaroj! – pensas kuracisto, – nenia helpo! Li verŝajne havis malmolan vivon, ĉar lin tamen kaptis ftizo. Povas esti, ke li iam eĉ ne satmanĝis, kaj ke li devis el loĝejo en loĝejon – sinjoro studento. Kaj nun venis – oni diru – la venĝo. Jes – jes! Bedaŭrinde – estas malĝoja vero, kaj terurega nia situacio tion ĉiutage dokumentas, ke post kvindek jaroj la statistiko cifere montros, ke dudek kvin procentoj de niaj homoj mortas pro ftizo.

– Panjo – balbutetas infaneto.

Sed tuj la patrino turniĝis, kaptis la malgranduleton sur manojn kaj premis ĝin sur sian amantan koron. Kvazaŭ iu volus ĝin rabi for de ŝi. Kaj poste ŝi turnis sin al fenestro kaj jam centan fojon silentege esploris.

La mortanto ekmovis sin.

Kaj denove estis silentege ... Ĉu li ekmemoros gepatrojn, adiaŭos ilin? Li ankoraŭ unufoje malfermu okulojn! Ili ne vidis ilin jam la duan tagon.

– Nenio ... Silento.

Kaj dume la mortanto sonĝas sian lastan surteran sonĝon.

... Neniu tion scias, neniu, neniu sur la vasta mondo! Sed li – Paŭlo – staras jam ambaŭpiede en la ĉielo.

Kaj tie ĉi ie estas tio, kiel la mortanto movas per mano, dekstre kaj maldekstre de ni ... Tie en malproksimo brulas la suno kaj brilas la steloj. Sur la ĉielo etendiĝas nubetoj ĝis liaj haroj. Kaj antaŭ okuloj tremas fajreretoj kaj sonas kanto, kiu ne havas takton kaj ŝajne eĉ ne harmonion. Jes, sed tiel estos: la harmonio

eksonegos, kiam grandaj aferoj montriĝos sur la horizonto .. Nun ĝi eksonis.

Venas malrapide anĝeloj, post ili iaj maljunuletoj kun blankaj haroj kaj junaj homoj kun tre molaj rigardoj. Kaj ĉiu, kiel vin rigardas, kvazaŭ etendus al vi manojn.

Kaj jen iras li mem, li vivanta, palpebla, – Sinjoro Kristo kaj diras bele laŭte: Vi jam estas tie ĉi?

Larmoj de la feliĉo eniras okulojn de la alparolito. Li ĉirkaŭrigardas konfuzo ...

Ĉu vi serĉas iun?

Oh! Rapide turniĝas pensoj en la kapo kaj en la animo. La homo tiel volonte ekmemorus; li havas ja tion ie tie skribitan, kiun li ĝoje trovus en paradizo kaj ne povas rememori tion.

Sed kio estas? Ia malnova, forgesita afero, eniras cerbon de la konfuziĝinta homo, li jam pensis – sub tero ĝi dormas kaj ne vekigis, sed nun jam ĝi estas tie ĉi kaj superas ĉion alian: Estas tie ĉi Feldman? – demandas Paŭlo.

Vizaĝo de la Savinto estas plena de miro – kaj kiu estas li? – estas demando.

– Hundo!

– Oh! oh!

Ĉiuj ekridetis. Nu, tiu historiaĵo estis tamen certe konata en la ĉielo! – Li – Paŭlo – devis helpi patron, aŭ pli bona dirite, – helpadis patron en la malgranda komerceto, kies komercaĵoj ĉiun tagon matene je la kvara horo estis disportataj en vilaĝojn sur veturileteto trenata de hundoj. Unu fojon vetu-

ris la patro (patro! patro! sonas subite kiel teruregaj sonoriloj) kaj alian fojon la fileto – kaj kun ili ĉiam Feldman kaj Tigro, du fidelaj hundoj. Pluvis, frostis ĉio estis egala; aferoj devis esti faritaj. Ankaŭ plezureto estadis kelkfoje ĉe tio. Ĝi estis tiam, kiam Feldman, maljuna ĉasista bundo, levis buŝon kaj ekflaris leporon. Sufiĉis sole la hundon froteti sur kapo kaj en oreton mallaŭte diri: Feldman! leporeto – leporo – iru! Kaj la hundo rememoris sian junecon kaj sian estintan gloron, kaj kuris ĝis radetoj de la veturileteto disiĝadis ...

... Sed poste okazis iun tagon, ke la gepatroj dum malriĉo kaj bezonego enskribigis Paŭlon en gimnazion, kaj ke en la gimnazio estis profesoro, kiu estis minacinta al Paŭlo per eligo, se li ne alportos en lernejon cirkelon. Kaj cirkelo kostis – sepdek krejcerojn. Kaj tiam estis tiela mizero en la familio, ke oni eĉ terpomojn ne kuiris.

Staris la patro en konto kaj ploris. Tia mira, terura vivo rigardis vizaĝojn de ĉiuj, ke oni ne povis fari eĉ unu paŝon el ĝi.

Sciu! diris multimema direktanto de la vivo – prenu la hundon kaj iru vendi ĝin! Eble iu tamen ion donos por ĝi, kaj eble unu ankaŭ iel sufiĉos.

Post momento staris la knabo kun la hundo en strato kaj ne povis iel moviĝi. La hundo nome rigardis la knabon, kaj la knabo la hundon. Nur post unu horo post sencela vagado tra urbo ekpaŝis en mallarĝan strateton – al hundbuĉisto. Li longe ridis nur poste pro kompatado donis kvardek krejce-

rojn. La knabo malrapide iris al por-do. Ankoraŭ unufoje li reen turnis okulojn de Feldinan rigardis lin ...

Ankaŭ en eterno oni vidas tion: dormis en ili malĝojo de la vivo, dormis en ili senrezulta juneco kaj mizero de estinteco, laco de teruregaj, grizaj tagoj, dum kiuj blankiĝis patraj haroj kaj patrinaj lipoj preĝis preĝon daŭre pli firman kaj pli mirindan.

... Havi iam tiun beston ĉe si, povi froteti ĝin, en orelojn direkti al ĝi malnovan militan devizon –!

Oh!

Jen ĝi alkuras subite sur neĝblanka substrato de nuboj havante homan ridon en sia besta vizaĝo, kaj jam eĉ al piedoj aliĝadis sin, kaj jam oni povis eĉ froteti ĝin, senti ĝian spiron, ĝian ĝojon, konfuzon de ka junco kaj ĉion tion, pri kio oni jam ne povas paroli.

– Silentu! mallaŭte diris la patro kaj ree kliniĝis super la mortanton. Ĉiuj piete genufleksis. Vizaĝo de la malsanulo subite ekstremetis, manoj ekmoviĝis. La plej feliĉa rideto aperis sur la vangoj. Kaj nun eĉ buŝo ekparolis:

– Iru! – Feldman! – Iru! Leporeto! – Leporo!

Memoro de la ĉeĥa Esperanto-movado

En la nova retejo www.esperanto.cz ni malfermis novan rubrikon *Paměť českého esperantského hnutí* (sub *O esperantu kaj Historie*), kies celo estas konservi informojn pri memorindaj personoj, organizoj, objektoj,

periodaĵoj, libroj kaj literaturo de nia movado.

Fakte jam plurajn jarojn ni kolektas tiajn informojn en Vikipedio, sed tie rajtas esti nur personoj kaj aferoj gravaj por la tutmonda movado, dum por ni gravas ankaŭ aferoj klubaj. Plie ni kolektas ankaŭ literaturaĵojn, tial ni skanas niajn gazetojn, klubajn bultenojn kaj informilojn, la plej valorajn tekstojn ni grupigas laŭ aŭtoroj kaj tradukintoj.

La rakonto de Mahen *Hundo en la ĉielo* tradukita de nun nekonata Jan Havran estas montrado de tiu agado, kiu povas revenigi en nian historion verkojn kaj personojn jam forgesitajn.

Plia impulso estis iniciato de Esperantologia kaj Literatura Forumo (ELFo), kiu jam alparolis multajn el vi petante plenumi enketilon pri vi mem aŭ pri jam forpasintaj samideanoj, kiujn vi konis. Necesas kolekti rememorojn, kiam la memorantoj ankoraŭ vivas.

-mm-

Artikolo n-ro 1300

Nelonge post kiam mi kreis Vikipedian ĝermo-paĝon pri negrava vilaĝo Barchov, mi ricevis sekvantan mesaĝon: „*Gratulojn, Josef! Via artikolo Barchov estas la 130 000-a artikolo en nia Vikipedio. Ĉar temas pri vilaĝo proksima al via loĝurbo, eble vi eĉ povus interesigi lokajn gazetojn pri tiu atingiĝo, ĉu? Amike, Winston Smith, 15:45, 2. Jun 2010 (UTC).*“

Interesa hazardo, ĉu?

Josef Hron

Nova koresponda kurso

Laŭ la lernolibro de Stano Marček enĉeĥigita de Max Kaŝparŭ *Esperanto pŕimou metodou* estiĝis nova koresponda kurso (625 Kč inkluzive de la lernolibro kaj CD, 500 Kč por ĈEA-anoj). La lernolibro havas 22 lecionojn, komenci oni povas kiam ajn. La libro estas riĉe ilustrita, sed ne havas informojn pri la movado kiel la koresponda kurso de Josef Cink. Avantaĝo estas, ke la kurso de Marček jam aperis en 25 lingvoj, do la studintoj en diversaj landoj havas preskaŭ la saman vortprovizon.

Ankaŭ la malnova kurso de Josef Cink funkcias (600 Kč); tiu ne havas ilustraĵojn, sed riĉajn informojn pri la movado kaj literaturo. Laŭ ĝi instruas Mirka Tomeĉková, sed ŝi povas instrui ankaŭ laŭ la nova kurso de Marček.

Ekzistas ankaŭ son-versio de la Cink-kurso legita de Eva Seemannová kaj Valda Vinař ĉe la adresoj

http://esperanto.cz/mp3/cink_a.mp3

http://esperanto.cz/mp3/cink_b.mp3




La interesatoj do povas elekti kurson kaj kursestron jene:

Max Kaŝparŭ - Kurso de Stano Marček
max.esperanto@gmail.com

Mirka Tomeĉková - Kurso de Josef Cink aŭ de Stano Marček
mirka.tomeckova@seznam.cz

Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj



La 19-paĝan libreton esperantigis Marek Blahuš kaj eldonis KAVA-PECH en 2010.

Novaj libroj en Esperantujo

laŭ *Laste aperis* de UEA

* Stephan Lang: **La Transilvania nupto**, VoKo 2010 (19.50 EUR)

* La Nova Testamento: **Flanke je Jesuo**. Vol. 3. Religio, VoKo, 2010 (19.50 EUR)

* Aleksander Korzhenkov: **The Life of Zamenhof**, Mondial 2010 (9.90 EUR)

* **Esperanto en Bydgoszcz pli ol 100 jarojn**, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo, 2010 (2.10 EUR).

* Adjévi Adjé: **El togolanda saĝosako**, originalo, MAS 2010 (7.50 EUR).

* Ivan Efremov: **La Nebulozo de Andromedo**, MAS 2010 (23.10 EUR)

* Ino Kolbe: **Mia vivo kun kaj por Esperanto**, Movado 2003 (7.50 EUR)

* Antologio: **El la germana poezio**, W. Nüesch 2010 (9.90 EUR)

* Michel Kenton: **Rajmondo kaj la paneinta stelo; Rajmondo kaj la drako; Rajmondo kaj la girlandoj de Kristnasko; La kunikleto Antoneto kaŝludas en la brasikĝardeno; Antoneto naĝludas; La kunikleto Antoneto naĝas en la lageto; Antoneto golfludas La kunikleto Antoneto golfludas kun siaj amikoj** (Simplaj infantekstoj po 6.00 EUR)

* Giovanni Pico della Mirandola: **Parolado pri la homa digno**, Fonto 2010 (13.20 EUR)

* Pribislav Marinković: **Vortaro de fruktoj, legomoj kaj spicoj** (7.50 EUR)

* Alexandre Dumas: **La Grafo de Monte-Kristo**, FEL 2010 (74.70 EUR)

Pozvánka na konferenci ČES

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (ČES) si Vás dovoluje pozvat na konferenci ČES, která se bude konat **ve dnech 24. – 26. září 2010 s možností prodloužení pobytu do 28. září** (státní svátek), tentokrát v krásném prostředí lázni Poděbrad.

Samotné město, rozkládající se 50 km východně od Prahy, jistě není třeba široce představovat. Klidné místo plné zeleně i elegantní architektury, rovinný terén vhodný pro fyzicky nenáročnou vycházku, zámek nad řekou Labem, minerální prameny a útulné cukrárny a kavárny, to vše tu čeká právě na vás. Věříme, že nám bude přát počasí a že kromě účasti na konferenci přispěje tento pobyt i k vaší regeneraci.

Program, ubytování i stravování jsou zajištěny pohodlně v jednom areálu, a to ve Střední odborné škole zemědělské v Boučkově ulici č. 355/49, umístěné ve vilové čtvrti cca 800m od nádraží a hlavního lázeňského parku.

K naší dispozici bude velký sál pro plenární zasedání, prostory pro tematické programy, Libroservo a občerstvovna.

Ubytování je nabízeno v 1-3lůžkových pokojích s vlastním sociálním zařízením. Stravování v místní školní jídelně zahrnuje i možnost vegetariánské stravy.

Páteční odpoledne můžete věnovat odpočinku, procházkám po městě a setkání se svými přáteli. Komponovaný večerní program bude věnován aktualitám a zajímavostem z esperantského světa a promítání nových krátkých filmů.

Po pracovním jednání v sobotu dopoledne budete mít po obědě příležitost seznámit se s městem v doprovodu místní-

ho průvodce. Na prohlídku budou navazovat volitelné semináře na jazyková témata a příp. schůze sekcí a pracovních skupin.

Na sobotní večer pro vás stejně jako v loňském roce připravujeme koncert klasické hudby v esperantu a taneční zábavu s tombolou.

V neděli dopoledne vám opět nabídneme tematické semináře a prezentaci nových projektů a aktivit ČES se závěrečnou diskusí.

Zároveň vám tentokrát nabízíme možnost výhodného prodloužení pobytu o pondělí a úterý, kdy budete moci zdarma absolvovat dle svého výběru několik počítačových školení (Počítač pro začátečníky, Esperanto na Internetu, Wikipedie pro začátečníky i pokročilé, Zpracování zvukových a filmových nahrávek).


Ostatní mohou pobyt využít k relaxaci, objednání lázeňských procedur či výletům do okolí.

Na nedělní odpoledne vám nabídneme autobusový výlet do Přerova nad Labem s návštěvou místního skanzenu a soukromého muzea historických bicyklů a motocyklů. Je rovněž připravována alternativní trasa pro zájemce o pěší turistiku.

Večerní programy budou připraveny po dohodě s účastníky.

Vzhledem k dostatečné ubytovací kapacitě můžete tentokrát s sebou vzít příp. i své partnery-neesperantisty a zajistit jim příjemný lázeňský pobyt za bezesporu výhodných finančních podmínek.

Na vaši hojnou a aktivní účast se těší
výbor ČES



Knihy z UEA

Ve snaze rozšířit sortiment Knížní služby našeho svazu (Libroservo) nabízíme možnost zprostředkovat nákup některých knih podle katalogu UEA. Zájemci budou platit v českých korunách, i když v nabídce uvádíme ceny v eurech podle zmíněného katalogu. Knihy budou předány na konferenci nebo zaslány poštou. Pokud bude mít akce úspěch, budeme v ní pokračovat.

K objednání můžete použít i přihlášku na konferenci, její poslední část. Objednat knihy mohou i ti, kteří se konference nezúčastní, a je možno si objednat i jiné knihy, CD a materiály podle katalogu UEA: <http://katalogo.uea.org/>, než které nabízíme. Bylo by ale dobré si zjistit, zda se kniha v katalogu nachází bez poznámky *nehavebla*.

Předkládáme náš výběr:

Auld: Esperanta antologio (12,30 EUR) – **Auld:** Nova Esperanta krestomatio (1991) (12,30 EUR) – **Boulton:** Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj (2005) (1,80 EUR) – **Cherpillod:** Etimologia vortaro de la propraj nomoj (19,50 EUR) – **Cherpillod:** Konciza etimologia vortaro (2007) (21,60 EUR) – **Eco:** Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo (1994) (2,10 EUR) – **Eco:** Serĉado de la perfekta lingvo (Edistudio Pisa) (16,50 EUR) – **Erasmus:** Laŭdo de l' stulteco (1998) (6 EUR) – **Figliera:** La strategio de Esperanto en la nova jarmilo (2000) (2,10 EUR) – **Hagége:** Esperanto kaj lingva diverseco (2006) (2,70 EUR) – **Kolker:** Vojaĝo en Esperanto-lando (2005) (18 EUR) – **Lapenna:** Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (2009) (9,90 EUR) – **Phillipson:** Ĉu nur – angla Eŭropo? defio al lingva politiko. (rec.Blanke - Fundamenta verko de la eŭropa lingvopolitiko) (21 EUR) – **Wennergren:** Esperantologio kaj la interreto (2007) (9 EUR)

Objednávky do konce července 2010 zašlete na adresu: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnický@quick.cz.

Komitatanoj B

La 1-an de junio 2010 okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses Komitatanoj B por la periodo 2010-2013. Por tiu tasko la Estraro de UEA nomumis komisionon, kiu konsistis el la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller kaj la individuaj membroj Rob Moerbeek, Piet Schuil, Francisco L. Veuthey kaj Atie van Zeist. La stabo de la Centra Oficejo asistis la komisionon en la nombrado, kiu daŭris iom pli ol kvar horojn.

Balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. La balot-aktiveco klare superis tiun de la antaŭa fojo en 2004, kiam 29,0% de la membroj voĉdonis, sed ĝi ne atingis la rekordon de 33,6% en 1998.

Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis Mark Fettes. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis Probal Dasgupta (973), Barbara Pietrzak (876), Amri Wandel (820), José Antonio Vergara (816) kaj Wu Guojiang (732). Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen (613), Marija Belošević (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).

La Komitatanoj B reprezentas en la supera organo de UEA la individuajn membrojn. Por ĉiu komencita milo da membroj estas unu Komitatano B. Krome ĉiu landa kaj faka asocio, aliĝinta al UEA, rajtas nomumi Komitatanon A (Libuše Hýblová por ĈEA), se ĝi havas pli ol 100 membrojn.

laŭ Gazetara Retkomuniko de UEA

5-a Sabla Printempo

9.-11.4.2010 en Písek

La ĉi-jaran seminarion partoprenis kvardeko da homoj ne nur el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Slovakio, Germanio, Pollando kaj Francio.

La organizantoj (ĈEA, loka klubo „La Ponto“, ĈEJ, E@I) instruis komputile prilabori tekstojn kaj fotojn, subtekstigi kaj paroligi (dubli) videofilmojn kaj esperantigi turismajn informojn. La aranĝon finance subtenis la urbo Písek, kies propagandilojn la seminarianoj esperantigis.



Unu el la lernitaj lertoj - kunmeti du fotojn

La vendreda vespero estis dediĉita al informoj pri E@I, Esperanto.com, lingvohelpilo, E-librejo, Vikipedio kaj Ipernity. La kursoj komenciĝis sabate.

La unuan grupon gvidis Peter Baláž, kiu prezentis multajn programojn trovablajn en la reto, per kiuj eblas prilabori fotojn kaj fari verajn miraklojn. Miroslav Malovec aldonis siajn spertojn kun ciferecigado (enkomputiligo) de malnovaj presitaj tekstoj per programoj

OCR, kiuj scias deĉifri literojn. Ambaŭ lertoj estos aplikeblaj por la nova komuna retejo de ĈEA kaj ĈEJ, same kiel por la projekto Bretaro de E@I (interreta multkomunikila Esperanto-datumbazo).

La dua grupo sub gvido de Marek Blahuš kaj Vladimír Türk lernis Esperante subtekstigi kaj paroligi mallongajn filmojn. Ekz. Jan Řepa, nomata Fidel, amatora aktoro el Netolice, donis sian voĉon al filmetoj pri Písek kaj la kastelo Zvíkov, kiuj jam baldaŭ spekteblos en la interreto.

En la tria grupo Pavla Dvořáková kaj Aleš Tomeček klarigis, kiel kontribui al la nova portalo Esperanto.cz, komuna por ĈEA kaj ĈEJ.

Sabate antaŭ la tagmanĝo ĉiuj komune vizitis la ekspozicion en la Urba Biblioteko ĉe la proksima placo (vidu sekvan paĝon). Post la reveno de la tagmanĝo trafis ĉiujn informo pri la tragedio de la pola aviadilo ĉe Smolensk antaŭ kelkaj horoj. Sekvis posttagmezaj prelegoj.

La vespera kultura programo estis komencita per minuto da silento honore al la viktimoj. Estis projekciitaj filmoj pri Písek, Venezuelo, pola socikultura gazeto, bildoj pri Slovakio, E-kantoj, Sekretaj Sonetoj, kvizo pri inteligenteco kaj slovaka filmeto avertanta infanojn pri danĝeroj de interreto (misuzoj de enretigitaj fotoj). La eldonejoj KAVA-PECH kaj Espero proponis siajn librojn.

Dimanĉe ĉiuj tri grupoj kolektiĝis kaj prezentis al la aliaj, kion ili lernis kaj kun kiaj rezultoj. Krom diversaj sorĉoj pri bildoj la ĉefaj rezultoj estis la jam menciitaj filmetoj pri Písek kaj Zvíkov kaj detala vikipedia prezento de la urbo. La programo finiĝis elokvente per poemo *Adiaŭ kaj tuket'* de Vítězslav Nezval en brila prezento de Miroslav Smyčka.

Petro Baláž prezentis interesan novaĵon: elektronikan „paperon“, specialan legilon por elektronikaj libroj. Ĝi estas granda kiel ordinara kajero, malpeza, sur ĝia ekrano aperas tekstoj, kies grandecon oni povas adapti al la bezonoj de la okuloj. La ekrano ne lumas, ne damaĝas okulojn nek konsumas elektron, ĝi povas resti kuŝanta dum monatoj sur tablo kun ŝaltita teksto. Tial ĝi estas nomata elektronika papero kun elektronika inko. Elektron el miniatura baterio ĝi bezonas nur por ŝanĝi la tekston al sekva paĝo, poste ne plu. Oni povas komforte nesti en fotelo kaj trankvile legi kiel klasikan libron. Supozeble la novaĵo baldaŭ disvastiĝos kaj la prezo falos al sumo akceptebla por ordinaraĵoj.



La partoprenantoj ricevis KD-on kun adresoj de interesaj retejoj uzablaj por la laboro kaj aliaj interesaj materialoj. Ĝi sendeblas ankaŭ al aliaj interesiĝantoj, bv. skribi al pisek@esperanto.cz.

Estas deziro kaj espero de la organizantoj, ke la akiritajn sciojn kaj kapablojn la partoprenintoj plu uzu ne nur por sia persona bezono, sed ankaŭ por la progresigo de Esperanto.

-mm-

Esperantigitaj filmoj pri Zvíkov kaj Písek

Jen unu el la rezultoj de la seminaria laboro dum la ĉi-jara Sabla Printempo!

Temas pri profesie faritaj mallongaj filmoj kreitaj por la urbeŝtato de Písek, kiuj estis kun permeso esperantigitaj. Al tradukoj de geedzoj Vladimír kaj Pavla Dvořák donis ŝian voĉon Jan Řepa, tondis Bohumil Řepa, reĝisoris Vladimír Türk.

Nuntempe vi povas ambaŭ filmetojn vidi kaj senpage elŝuti en <http://www.ipernity.com/home/tuurq>, baldaŭ supozeble ili aperos ankaŭ en Youtube kaj en la interreta televido Písek.



Ni bonvenigos interesulojn, kiuj volas lerni kaj realigi subtekstigon kaj E-paroligon de mallongaj filmoj. Ĝi estas sendube interesa kaj riĉiga ideo i.a. por agado de la lokaj kluboj! Postuloj por teknikaj kondiĉoj estas minimumaj (kuti-ma komputilo, simpla mikrofono, sen-paga programaro).

Instrua seminario pri tiu ĉi temo okazos i.a. post la ĈEA-konferenco en Poděbrady 27.9.2010. Kontaktadreso:

komputado@esperanto.cz. -pd-

Jubilea lingva seminario en Skokovy

En la bela loko de Bohemia Paradizo, en vilaĝo Skokovy, kiu estas jam bone konata al esperantistoj, okazis de la 12a ĝis la 18a de aprilo 2010 jam la jubilea trideka lingva seminario. Fakte, la unua estis en la jaro 1995 kaj ĉiujare ĝi okazadis printempe kaj aŭtune.



Ĉi-jare en la pensionon Espero venis 45 gesamideanoj precipe el Ĉeĥio, sed ankaŭ el Slovakio, Germanio, Nederlando, Pollando kaj Francio.

La prezidanto de AEH Pavel Nechvíle solene bonvenigis partoprenantojn kaj al tiuj, kiuj plej ofte ĉeestis la seminarion, transdonis memorigan ateston kun donaceto. Sekvis video-filmo, amatore preparita el multaj kronikoj kaj fotoalbumoj de ĉiuj tridek restadoj dum 15 jaroj, pri kio ĉefe meritas Jarmila Rýznarová kaj Jiří Kosnar. La filmo sur DVD estas mendebla en la redakcio de Informilo. (aeh-ikeh@volny.cz)

Dum la tuta semajno Jana Křížková estis gvid-animo de ĉiuj programoj de

la matena gimnastiko ĝis adiaŭa vespero. Ludmila Srbová zorgis pri financaj aferoj, kurson por komencantoj gvidis Líba Filipová, konversacian grupon Jarmila Rýznarová kaj tradukgrupon Margit Turková, posttagmezajn manlaborojn instruis Eva Pánková.

Posttagmeza busekskurso zorgeme preparita de Pavel Nechvíle estis tre interesa. La partoprenantoj rigardis en Pěňčín la produktadon de kaprinfromaĝoj en farmbieno kaj produkt-ejon de vitraj bidoj, en la urbo Železný Brod ili vidis alian produktejon de vitraj bidoj kaj etnografian muzeon en Běličtě.

Vesperaj prelegoj estis tre interesaj: De Slovakio (M. Fejfičová pri mon-sistemoj eksa kaj nuntempa) ni pere de la filmoj transflugis tra Germanio (Internacia Festivalo) ĝis Venezuelo (filmo, fruktoj, muzikiloj de L. Gabalda), ni aŭdis pri mineraloj, ŝtonoj kaj arboj (de J. Pokorný), ni estis informitaj pri 80 specoj de dolĉaj kaj salaj pudingoj en la mondo (de M. Turková), kaj pri la unua virino premiita per Nobel-premio, kiu estis ankaŭ esperantistino, pri grafino Bertha von Suttner (prelegis J. Kříž).

La adiaŭa vespero kun riĉa tombolo, kvizo, spritaj versaĵoj, anekdotoj kaj kun kantoj ĉe la gitara akompano de M. Kolářová estis vere gaja. Kaj ni adiaŭis kun demando – ĉu ni kapablos prepari ankoraŭ pluan seminarion? La respondo: **JES! De la 11a ĝis 16a de aprilo 2011.**

Jarmila Rýznarová

KAEST 2010

18.-21.11.2010

„Konferencon pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko“ gastigos malgranda slovaka urbeto Modra-Harmónia, nur 30 km de la ĉefurbo Bratislava kaj 90 km de Vieno. (La loko de SES 2008 kaj 2009 por tiuj, kiuj partoprenis.)

Ĉeftemo de KAEST 2010: „Modernaj teknologioj por Esperanto“

La programo konsistos el kelkaj partoj:

- * prelegoj (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj)
- * trejnado (Vikipedio, komputila laboro, metiejoj ks.)
- * fakaj diskutoj (pri certa temo)
- * vespera (neformala) programo (vingustumado, filmo-prezento, diskutoj)
- * eblaj ekskursoj (laŭ interkonsento kaj mendoj)

E@I-teamo invitas vin ĉiujn – ĉu aliĝi kaj prelegi aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en KAEST 2010. Por ke la faka vivo en Esperanto evoluu!

Kaj kion signifas partopreni en KAEST? Simple ĝui prelegojn, prezentojn, diskuti pri scienco kaj tekniko, praktike ekzerci, utiligi novakiritajn sciojn.

Novaĵoj:

Per kio estos ĉi tiu KAEST alia ol tiuj antaŭaj, okazintaj en Ĉeĥio?

- * pli longa (KAEST okazos jam ekde ĵaŭda posttagmezo ĝis dimanĉa tagmezo, do 1 tagon pli)

* pli da praktika scienco (atendas vin trejnado, povante provi/testi/malkovri mem certajn aferojn)

* vingustumado (por la interkona vespero, por pli bone konatiĝi kaj amikiĝi)

* eblo de ekskursoj (dum vendreda antaŭtagmezo kaj dimanĉa posttagmezo)

* por fakaj sekcioj/grupoj propono fak-kunsidi antaŭ/post KAEST! (vidu pli en la parto „programo“)

Pliajn informojn vi trovos ĉe <http://www.ikso.net/kaest/>

Študijné stredisko ÚJOP ČĎV UK
Modra- Harmónia

Modra-Harmónia č. 3553

SK-900 01 Modra, Slovakujo

www.modra.cdvuk.sk; www.cdvuk.sk

300 000 Vikipediaj artikoloj esperantigitaj

Eĉ ne en du monatoj la tradukilo WikiTrans de la dana lingvisto Eckhard Bick tradukis 300.000 artikolojn de la angla Vikipedio al surprize bona, kvankam ne senpeka Esperanto. Post jaro oni probable atingos tri milionojn.

La tradukoj ne troviĝas en la Esperanta Vikipedio (tiu havas 130 000 artikolojn), sed en propra retejo. Ĉe la blogo de Bernhard Pabst www.ipernity.com/blog/37943/248693 oni nun diskutas pri la estonteco de la projekto kaj pri maniero de korektado de la maŝinaj tradukoj.

laŭ RET-INFO

Efemera geografio

La mondo senĉese, ĉiusekunde ŝanĝiĝas, do la scienco, kiu priskribas ĝin, nome geografio, ankaŭ senĉese ŝanĝiĝas, tamen ĝiaj indikoj estas ĉiam fakte historiaj. Regnoj malaperas, aperas novaj, urboj kreskas, ŝanĝiĝas iliaj nomoj, homkvanto pligrandiĝas ktp. Ekzemple en Niĝerio en la jaro 1950 vivis 23 279 000 loĝantoj, en la jaro 2002 jam 146 675 000 loĝantoj, prognozo por la jaro 2025 estas 203 000 000 kaj por la jaro 2050 eĉ 278 800 000 loĝantoj. Male en Eŭropo la loĝantkvanto nun malgrandiĝas malgraŭ enmigrado de azianoj kaj afrikanoj.

Natura medio ŝanĝiĝas malrapide, sed la indikoj pri ĝi ŝanĝiĝas pli rapide danke al ĉiam pli kaj pli preciza mezurado kaj ankaŭ al alinomado. Ekzemple en la atlaso, eldonita en la jaro 2006, kiel nomo de Marokia kabo anstataŭ *Punta Marroqui* estas *Punta de Tarifa*.

En la lastaj 50 jaroj multfoje ŝanĝiĝis indikoj pri longo de riveroj, altitudo de montoj ktp. Indikoj pri longo de iuj riveroj, ekzemple Nilo, ne ŝanĝiĝis, estas en ĉiuj fontoj egalaj. Iuj riveroj, ekzemple Misisipo, „mallongiĝis“, sed plej multaj riveroj „plilongiĝis“. Nur kelkaj ekzemploj:

Riverlongo en kilometroj

Rivero	Jaro 1956	Jaro 2006	Plilongiĝo
Amazono	6280	7062	782
Jangzio	4980	6300	1320
Obo	5300	5568	268
Jenisejo	5391	5550	159
Hoangho (Flava r.)	4200	5464	1264
Kongo (rivero)	4370	4835	465
Dnepro	2283	2285	2

Dnepro „plilongiĝis“ nur je 2 km, sed Jangzio je 1320 km, kio estas pli multe ol tuta longo de multaj riveroj, ekzemple Elbo. Longon de Amazono nun oni mezuras de fonto de la plej longa fontrivero.


Longo de multaj riveroj pligrandiĝis, male altitudo de multaj montoj malgrandiĝis :

Altitudo en metroj

Monto	Jaro 1956	Jaro 2006	Malaltiĝo
Everesto	8882	8850	32
Akonkagvo	7035	6959	76
Kilimanĝaro	6010	5892	118
<i>Puncak Jaya</i>	5030	4882	148
Tahato	3000	2918	82
Olimpo	2918	2911	7
Gerlaĥmonto	2663	2655	8
Koŝĉuŝko	2240	2230	10
Neĝmonto	1603	1602	1

Ameriko perdis sian unusolan sep milmetran monton, Afriko unusolan ses milmetran monton, Oceanio kvin milmetran monton, la alĝeria montaro Ahagaro tri milmetran monton. La plej alta monto de Aŭstralio, Koŝĉuŝko, „malaltiĝis“ nur je 10 metroj, eŭropaj montoj ankoraŭ pli malmulte. Post kiam degelos polusaj glaĉeroj, malgrandiĝos altitudo de ĉiuj montoj en la mondo.

Altitudon de la Neĝmonto oni mezuras laŭ nivelo de la Balta maro. Kiam Bohemio estis parto de Aŭstria-Hungaria regno, oni mezuris ĝin laŭ nivelo de la Adria maro en Aŭstria-Hungaria haveno Triesto. Tiam altitudo de la Neĝmonto estis 1605 metroj.



Lubomír Středa

Premio Křesadlo por Věra Marešová

La urbo Pelhřimov aljuĝas al volontuloj de la urbo premion Křesadlo (Fajrilo). Ĉi-jare ĝin akiris Věra Marešová el Proseč pod Křemešníkem, kiu en Fokus Vysočina instruas Esperanton. Ĝuste tiel estas klarigita la aljuĝo de la premio.

Křesadlo bylo poděkováním za nezištnou práci dobrovolníků

Přijetím setkání, jehaž Návrat mělnického bylo poděkováním občanstvu lidem za nezištnou práci ve prospěch ostatních - takový byl náhľad pohledu v pelhřimovské katedře na Věru Marešovou, která se stala vítězkou Křesadla, čemu po obvyklé ladi, křesadlo dajaj nahoditostně vítěz, začalo vypracováním práce dobrovolníků. Věra Marešová je z Pelhřimova a Proseče pod Křemešníkem, která se stala vítězkou Křesadla, čemu po obvyklé ladi, křesadlo dajaj nahoditostně vítěz, začalo vypracováním práce dobrovolníků. Věra Marešová je z Pelhřimova a Proseče pod Křemešníkem, která se stala vítězkou Křesadla, čemu po obvyklé ladi, křesadlo dajaj nahoditostně vítěz, začalo vypracováním práce dobrovolníků.

MĚSTA NAJDETE NA WWW.PELHRIMOVSKO.CZ

Esperantistoj ĉe Pola Sejmo

La 4-an de marto 2010 la vicprezidanto de Pola Sejmo (la mal-supera ĉambro de la pola parlamento) - Jerzy Szmajdziński akceptis en la parlamenta geesperantistojn: d-rino habil. Ilona Koutny, Francisko Witucki, Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyżak kaj Mariano Zdankowski. La vicprezidanton akompanis deputito de Pola Sejmo, Leszek Aleksandrzak. La geesperantistoj prezentis al la vicprezidanto la deziron, ke Esperanto ricevu statuson de lingvo, samranga kiel la aliaj fremdaj lingvoj en la pola edukad-sistemo. La parlamentanoj kun bonvolemo rilatis al la propono. Ili sugestis, ke la E-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogi la iniciativon.

Horácké noviny pri Esperanto

Horácké noviny KULTURA Pátek 26. 3. 2010 / 5

Naplnují odkaz Jana Amose

... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...

Čtyři jazyky jednou ranou

... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...

Rovněm začíná jazyka

... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...
... a jen tak. Sile g...



Bedaŭrinde sinjoro Jerzy Szmajdziński (meze de la foto) estis inter la viktimoj de la pola aviadila tragedio la 10-an de aprilo 2010 apud Smolensk.

laŭ RET-INFO

Doktorino Kamila Bártlová el Okřišky estis intervjuata de la redaktoro Ivo Nechvátal la 26-an de marto 2010 en Horácké noviny.

En Opava trifoje kaj kvaran fojon kun Eduard Jitzovský

En la urbo Opava mi naskiĝis en 1937, februare 1941 mi ĉe miaj geavoj travivis vintran monaton kaj fininte miajn studojn mi en 1956 eklaboris en Pozemní stavby Opava. Kvaran fojon min direktis mense al mia naskiĝurbo la studenta romano *Fieraj Koroj*, verkita de juna Opavano Eduard Jitzovský, propranome Edvard Zajitz. Lian libron en ĉeĥlingva originalo *Hrdá srdce* publikigis la eldonejo Jitro en Prago en la jaro 1939. Mi ne povis kaŝi mian surprizon kaj timon, kiam mi estis invitita skribi recenzon pri la romano kaj ties tradukinto Ing. Jan Werner en Brno. La tradukinto trovis la libron baldaŭ post kiam li ekposedis Esperanton kaj jam en la jaro 1954 ĝin tradukis. Sed la manuskripton li ien kaŝis kaj trovis ĝin nur post 50 jaroj.


Mi povas diri, ke la libro min kaptis jam ekde la unua momento kaj ne liberlasis min pli frue ol mi ĝin dum solaj du vesperoj tralegis. La urbo Opava estis loko de du kunvivantaj nacioj, la ĉeĥa kaj la germana. La aŭtoro priskribas studentan vivon de ĉeĥaj gimnazianoj, studentoj de la lasta abiturienta klaso, kiun vizitis Patrik, kaj lian amikecan rilaton kun Jitka, studentino de alia mezlernejo en la sama urbo. Patrik vivas sola kun sia patrino kaj Jitka ĉe sia avino. Dekduo de la studentoj de lia klaso kaŝe, sen scio de la profesoroj, formas futbalan teamon kaj havas sukcesojn. Ili eĉ rompis la malamikemon al futbalo en la menso de ilia klas-profesoro Cerbo. En la dua parto de la romano vi trovos Patrikon studanta juron en Prago, kiam jam antaŭe lin forlasis Jitka. Tiu ĉi parto de la romano reale

priskribas la problemojn de freŝaj diplomitoj, kiuj ne povas trovi laboron kaj Patrik mem, por vivteni sin, vendas ĵurnalojn surstrate. El la vidpunkto de la nuntempuloj la problemaro de tiama nekontentiga socia vivo en Prago estas tre simila al nia hodiaŭa, kun tiam malbonsignaj indicoj de brutala interrasa malamo. Jitka, kiun Patrik feliĉe en Prago denove renkontis, tiam laboras sub estrino de kudro-laborejo, judino. Amantoj de ŝiaj du fratinoj estas ankaŭ judoj.

En la tradukita teksto, far Jan Werner, mi gustumis vicon da trafe tradukitaj esprimoj, kiujn mi ne povis pro manko de tempo ankoraŭ noti. Mi tie eĉ trovis spurojn de silezia dialekto, kun kiu mi konatiĝis post la jaro 1946, vivante en proksima Krnov. Mi nepre rekomendas la libron al ĉiuj, kiuj deziras tralegi interesan, instigan kaj kortuŝan historion de antaŭmilita studenta kaj socia vivo.

Necesas aldoni, ke la 24-jara aŭtoro la 20-an de oktobro 1939, post peza turmento, mortis kaj estis entombigita en la tombejo de Prago – Olšanské hřbitovy, kaj ankoraŭ diri, ke li mem en la romano *Fieraj Koroj* sian morton profetis.

Zdeněk Rusín



La libron distribuas la tradukinto Jan Werner, Dřínová 18, CZ-61200 BRNO; retadreso: wernerjan@seznam.cz. Prezo: 80 Kč + poŝta afranko

GRAND BIBLIO PRI KURISU KEI

Grand Biblio, belaspekta renoma periodaĵo de Nacia Biblioteko, aperigis en la numero de la 30-a de marto 2010 omaĝan artikolon pri la japana bohemisto kaj esperantisto Kurisu Kei verkita de Petro Chrdle. Estas klare, ke skribante pri Kurisu Kei estas plurfoje meciita lia rilato al Esperanto kaj ankaŭ, ke li estas honora membro ne nur de Ĉeĥa-Japana Asocio, sed ankaŭ de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de Universala Esperanto-Asocio. Por tiuj, kiuj ne konas la revuon, ni aldonu, ke ĝi estas ricevebla senpage en ĉiuj ĉeĥaj bibliotekoj, tamen en iuj malgrandaj filioj nur kun sufiĉe granda prokrasto.

La artikolo sur la paĝoj 38-39 portas titolon *Říp je takový kopeček?* (Ĉu Říp estas tia monteto?) kaj estas trovebla ankaŭ rete inter aliaj numeroj de la revuo <http://www.grandprinc.cz/titul/grand-biblio/2010/3-4/pdf/grand-biblio-2010-3-4.pdf>.


La artikolon senintence provokis la fama japana-ĉeĥa entreprenisto Tomio Okamura, kiu en intervjuo de Grand Biblio 7-8/2009 respondis, ke japanoj scias pri la ĉeĥa literaturo nenion. Ĉeĥaj esperantistoj poste atentigis la redakcion pri Kurisu Kei kaj liaj tradukoj el la ĉeĥa, kiujn li mem prezentas en la broŝuro *Co mi dala česká literatura* (Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo) eldonita de KAVA-PECH en 1996.

En la artikolo de Petro Chrdle aperis fotoj de Kurisu Kei ankaŭ kun Stanjo kaj kun Eva Seemannová, kiujn ni antaŭ nelonge rememoris.

-pch, mm-

Jubileo de Mácha

Antaŭ 200 jaroj la 16-an de novembro 1810 naskiĝis la plej granda ĉeĥa poeto, romantikulo Karel Hynek Mácha, kiu per sia poemo *Majo* donis al la ĉeĥa literaturo unuan majstroverkon, kiu ĝis nun aperis en 239 reeldonoj. Ekzistas ankaŭ du esperantigoj, de Tomáš Pumpr kaj Josef Rumler. Mácha postlasis ankoraŭ kelkajn rakontojn (*Márinka*, *Ciganoj*, *Křivoklad*), sed li ne povis verki pli, ĉar helpante ĉe incendio li estis trafita pulmito kaj mortis la 6-an de novembro 1836, nur dek tagojn antaŭ sia 26-jariĝo. Eĉ lia portreto ne konserviĝis, ĉiuj liaj bildoj estas nur fantazioj de artistoj.



Ankaŭ nia poeto Čestmír Vidman omaĝis la jubileon per propra libro *Poutník K. H. M.* (*Migranto K. H. M.*), kiu prezentas la vivon de la Mácha per versoj, kiuj priskribas la ĉefajn momentojn en la vivo de la poeto. La 134-paĝa estas ĉeĥlingva, sed la aŭtoro estas esperantisto, same kiel redaktistino Margit Turková. Eble iu sukcesos ĝin ankaŭ esperantigi.

-mm-

Adonido 2010

16.-18.4.2010 Ratíškovice



Jam tradicia renkontiĝo okaze de florado de rara floro adonido kunvenigis ĉi-jare tridekon da esperantistoj.



Herbeja deklivo kun la bela floro.



5 jaroj de nia Junularo

Dimanĉe la 16-an de majo 2010 en Kralupy nad Vltavou kunvenis 10 gejunuloj por festi la 5-jariĝon de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kiel memstara organizo. Ili vizitis la kastelon kaj naskiĝlokon de komponisto Anotnín Dvořák en la proksima Nelahozeves, promenis laŭlonge de Vultavo kaj vespermanĝis en restoracio sur monteto Hostibejk. Parolis prezidanto Daniel Mrázek kaj eksprezidanto Marek Blahuš, deklamaciata estis nova traduko el Seifert „Kralupy ne estas bela urbo“ kaj projekciata fragmento el preparata filmo pri Internacia Junulara Kongreso en Liberec 2009.

Sekvis gazetara konferenco en la praga klostro Emauzy, kie parolis honoraj gastoj Max Kašparů, Petr Chrdle, Jiří Patera kaj la jam menciitaj Daniel Mrázek a Marek Blahuš.

Pri la datreveno informis Ĉeĥa Gazetara Agentejo per sufiĉe bona artikolo <http://magazin.ceskenoviny.cz/zajimavosti/zpravy/477858>, kiun transprenis ankaŭ aliaj periodaĵoj, ekz. Novinky.cz:

<http://www.novinky.cz/veda-skoly/200433-.html>

Dan Mrázek parolis pri la datreveno ankaŭ en Ĉeĥa Radio 3 Vltava:

http://www.rozhlas.cz/mozaika/hoste/_zprava/733429

La datrevenon oni festis ankaŭ la 13-an de aprilo en Prago kaj la 12-an de majo en Brno. Por la 20-a de junio estas planata komuna aranĝo kun la pola junularo sur la monto Ĉantorio.

-mb-

Novaj ekspozicioj pri Esperanto

En Písek okazis ekspozicio pri Esperanto sub la titolo „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ ekde 15.3. ĝis 14.4.2010 en la Urba biblioteko en Písek (Alšovo nám. 85).



kaj sabate ekde 9 ĝis 12h. Marde 13.4. ekde 16h30 en la klubejo de la biblioteko okazis ĉeĥlingva programo por la publiko *Esperanto kaj (ne nur) literaturo*. La aŭtorino de la ekspozicio estis Pavla Dvořáková kaj la loka E-klubo. Pli da informoj vi povas ricevi ĉe:

pisek@esperanto.cz



Entute 23 paneloj A1-formataj kaj 3 librovitrinoj respegulis viglamaniere variecon de nunaj utiligeblecoj de Esperanto. Estas planate plu pruntedoni la materialon al aliaj interesitaj urboj. (Jam nun esprimis intereson České Budějovice, Tábor, Milevsko kaj Klatovy!).



La ekspozicio troviĝis en koridoro de la 1-a etaĝo kaj estis libere alirebla dum labortagoj (krom ĵaŭdo) ekde 9 ĝis 18h



Moravské Budějovice

preparis eĉ tri ekspoziciojn:

„Ĉu Esperanto peros Otokar Březina al aliaj nacioj?“ en Muzeo de Otokar Březina (Březinova 46) en Jaroměřice nad Rokytnou. Ĝi daŭros la tutan sezonon de aprilo ĝis oktobro.



El la verkaro de Otokar Březina aperis en Esperanto kiel memstara publikaĵo sole la eseo *Konstruado en alto* (Stavba ve výši) esperantigita de Theodor Kilian kaj eldonita de EK Třebíč (1982). Unuopaj poemoj aperadis dise tra la gazetaro aŭ restis en manuskriptoj. La unuajn tradukojn provis Stanislav Schulhof (Mia patrino), Stanislav Kamarýt (Naturo) kaj Rudolf Friedrich (La homaj aroj), lastatempajn Josef Rumler. Sed plej multajn plenumis Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek, kiuj kunlabore kun la praga esperantistino devenanta el Jaroměřice Jaroslava Míčová planis eldoni libron de la poezio de Březina. Sed en 1971 Míčová kaj Pumpr subite mortis, la plano restis nerealigita, tamen la tradukoj restis.

Březina apartenas al nemultaj ĉeĥaj aŭtoroj proponitaj por Nobel-premio, sed el ĉiuj li estas la plej malfacila.

La dua ekspozicio, ankaŭ en Jaroměřice nad Rokytnou, sed en biblioteko (OD Rokytná) estis tiu, kiu pasintjare estis en Moravské Budějovice: „**Honoro al Komenio aŭ kiel ni interkomunikos ene de EU**“. Ĝi estis vizitebla de la 6-a ĝis la 30-a de aprilo ĉiam lunde, merkrede kaj vendrede.




Ĉu ne sufiĉus unu lingvo?

estis la tria ekspozicio, kiu okazis en Muzeo de Metioj en Moravské Budějovice ekde la 30-a de aprilo ĝis la 23-a de majo. Ĝi estis parto de la ekspozicio „Sankta Klement Maria Hofbauer (Dvořák) kaj lia mesaĝo por ni“.



La sanktulo (1751-1820) naskiĝis en Tasovice kiel filo de ĉeĥa buĉisto Dvořák kaj lia germana edzino. Li sopiris iĝi sacerdoto, sed li unue devis lerni bakistan metion en Znojmo. Kiam li foriris en Italion, li tie helpis al senhejmuloj kaj militaj rifuĝintoj kiel bakisto. Li decidis fariĝi ermito kaj alprenis la nomon Klement Maria. Kiel 29-jarulo li komencis studi en Viena universitato teologion, kiel 33-jara eniris ordenon de redemptoristoj. Sendita al Varsovio, li zorgis pri senhejmaj knaboj en sia paroĥejo. Kiam Napoleono konkeris Varsovion, Hofbauer foriris al Vieno. Kiel konfesprenanto li influis ĉiujn tavolojn de la loĝantaro kaj estis police gardata, ĉar li klopodis rompi la jozefisman dekreton pri kontrolo de la ŝtato super la eklezio. Kanonizita en 1909.



Pliajn informojn pri ĉiuj tri ekspozicioj vi povas ricevi ĉe ilia iniciatinto kaj aŭtoro Viktor Dvořák, dvorakovi.mb@volny.cz.



La papo dum Pasko denove parolis ankaŭ en Esperanto



Maldekstre sub E Jitka Skalická

Novajoj el la Societo por internacia lingvo Esperanto en Brno - Kohoutovice

La bela loĝkvartalo Kohoutovice, konata ĉefe pro iamaj motorciklaj vetkuradoj *Grand Prix*, festas sian 800-jariĝon kaj nia esperantista societo sian 8-jariĝon, en majo 2010.

Iniciatintoj de ekesto de nia societo en Kohoutovice estis s-anoj Adolf Veselý, Slavomír Barták, František Frýbert, Milada Vondroušková, Marie Klimentová kaj ĉefe s-ano Jan Werner, kiu seninterrompe gvidis nian societeton ĝis la jarkunveno en januaro 2010, kiam la ŝipdirektilon transprenis s-anino Věra Podhradská, bone konata al ĉiuj Lančov-tendaranoj.

Niaj kunvenoj okazas regule unufoje ĉiumonate, la trian merkredon vespere. Krom la lingva, eduka kaj kultura klerigo, anoj de la societo propagandas nian urbon Brno kaj nian sudmoravian regionon pere de publika medio, persona agado, korespondado, amikaj vizitoj kaj s-ano František Frýbert kiel esperantista radio-amatoro per siaj radioelsendoj. Pri kontaktoj kun niaj ĝemelurboj ĉefe zorgas s-ano Jan Werner.

Okaze de ĉi-jara 800-jariĝa festo de Kohoutovice, s-anino Libuše Baroňová kaj s-ano Z. Závodný, kiuj loĝas en Kohoutovice, verkis Esperantan version de la historio de sia loĝkvartalo.

Specialaĵo de nia societo estas la fruktodona kunlaboro kun la rusa Kultura Asocio en Moravio. Temas

pri amikaj kontaktoj kun la rusa poetino Ljubov Vondroušková, nome pri subtenado de tradukoj de ŝiaj rusaj poemoj en Esperanton fare de la eminenta praga esperantisto s-ano Jaroslav Krolupper. Meze de januaro esperantistoj de Brno ĉeestis la bapton de ŝia nova poemkolekto *Iluzija - Iluzio*, kiun denove majstre tradukis en Esperanton s-ano J. Krolupper. Samideano Jan Werner lerte profitis la bapto-ceremonion por prezenti al ĉeestantoj la historion de Esperanto, ĝian vivkapablon, utilon por internacia komunikado kaj por la ĝenerala plibonigo de internaciaj rilatoj baze de Zamenhofa homaranismo.

*Z. Závodný
Brno, 24.2. 2010*

Publika enketo

La firmao SANEP Public esploras en la reto publikan opinion per diversaj enketoj. Inĝ. Josef Vojáček el Brno sendis plurajn enketajn demandojn, pri du li jam ricevis respondojn:

Ĉu vi kapablas verki fremdlingvan artikolon por eksterlanda gazeto?

JES 20,2% - NE 73,5% - MI NE SCIAS 6,3%

Ĉu vi konas du fremdajn lingvojn tiel bone, ke vi povas senprobleme legi en ili librojn kaj sekvi filmojn?

JES 12,2% - NE 86,4% - MI NE SCIAS 1,4%

La enketo okazis ĉeĥlingve inter la ĉeĥa loĝantaro.

laŭ Josef Vojáček

KALENDARO

2010-07-11/25 Flugkaravano al UK Kubo, chrdle@kava-pech.cz
2010-07-04/17 Unua etapo SET Lančov
2010-07-18/31 Dua etapo SET Lančov
2010-08-01/13 Tria etapo SET Lančov
2010-08-13/15 Renkonto de ekstendaranoj en Lančov, info@set-lancov.cz
2010-08-14/21 Ekotur en České Budějovice, chrdle@kava-pech.cz
2010-08-20/21 La 4-a Postferia (ĉi-jare Finferia) renkontiĝo en České Budějovice
2010-09-17/19 Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová
2010-09-24/26 Konferenco de ĈEA, Poděbrady, cea.polnický@quick.cz
2010-09-26/28 Seminario en Poděbrady
2010-10-11/17 InPaSem en Dobřichovice (S. Marček, M. Blahuš), chrdle@kava-pech.cz
2010-11-18/21 KAEST, Modra-Harmónia, Slovakio, P. Baláž, petro@ikso.net
2010-12-04 Marcipana Kristnasko en E-muzeo Svitavy, dvor.libuse@seznam.cz
2010-12-11 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek
2010-12-29 E-Silvestro en Česká Třebová, jk.esperanto@seznam.cz

Kalendaro 2011

2011-03 Centjariĝo de EK Olomouc, dudajanol@centrum.cz
2011-05-07/14 La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, ladislav.kovar@tiscali.cz

ESPERANTISTA VIVO

- la 3-an de aprilo 2010 mortis **Miroslav Tyrala** (85-jara) el Nový Jičín
- la 30-an de aprilo 2010 subite forpasis en aĝo de 77 jaroj **Jan Holba** el Písek, aktiva membro de Esperanto-klubo „La Ponto“.
- en Italio forpasis la 26-an de marto 2010 fama itala esperantisto **Mauro La Torre**, eksa prezidanto de ILEI kaj akademiano

Diplomverkoj


* La 24-an de majo 2010 studentino Eliška Votýpková sukcese defendis sian diplomlaboron „Esperanto en Ĉeĥoslovakio 1945-1970“ (ĉeĥlingve) ĉe la Karola Universitato en Prago, fako politologio.

* La 25-an de majo 2010 Dima Ŝevĉenko defendis sian magistran disertacion pri Periodaĵoj en Esperanto ĉe prof. M. I. Isajev en Rusia Universitato de Amikeco inter Popoloj.

* La 31-an de majo 2010 en urbo Jekaterinburg, Rusio, studentino Arina Osipova diplomiĝis pri la temo "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de la germana lingvo". Ŝi studis en la Urala ŝtata pedagogia universitato (UŜPU), instituto de fremdaj lingvoj.

Tabulludo por infanoj

Poreduka tabulludo **Esperanto en Bjalistoko** estas senpage elŝutebla en la Bjalistoka retejo www.espero.bialystok.pl/eo/article,138,7,1.html



Ĝia celo ne estas instrui Esperanton, sed pere de Esperanto konatigi infanojn kun la naskiĝurbo de Zamenhof. La ludo estas rezulto de konkurso, kiu finiĝis la 30-an de aprilo 2010.

laŭ RET-INFO

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

POZOR na změnu bankovního účtu!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 990,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 590,-Kč

La Gazeto: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 560,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 340,- Kč.

Juna Amiko: 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1010,- Kč (*670,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1090,- Kč (*730,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 670,- Kč (*450,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 290,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Periodikum Českého esperantského svazu - 41. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
tel. 774 928 974**

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2010

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 41-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.8.2010**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj:

1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Přihláška na konferenci ČES v Poděbradech ve dnech 24.-26.9.2010

příjmení: titul:

jméno: číslo legitimace:
(členové ČES)

adresa
ulice:

PSČ místo

email: telefon

číslo cestovního dokladu/OP: vegetarián: ANO / NE
chci ubytovat s: (pro stravující se)

Přihlašuji se závazně na **konferenci Českého esperantského svazu 2010 v Poděbradech**
a zavazuji se uhradit účastnický poplatek ve výši (zaškrtněte právě jednu možnost):

základní účastnický poplatek	<input type="checkbox"/>	300 Kč
zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES	<input type="checkbox"/>	200 Kč
čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen ČEJ	<input type="checkbox"/>	0 Kč

a současně objednávám následující ubytování a stravování (zaškrtněte požadované):

večeře v pá 24.9.	<input type="checkbox"/>	80 Kč	
ubytování v pá 24.9. v pokoji	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 280 Kč*)	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 310 Kč	1lůžkovém <input type="checkbox"/> 350 Kč
snídaně v so 25.9.	<input type="checkbox"/>	40 Kč	
oběd v so 25.9.	<input type="checkbox"/>	110 Kč	
večeře v so 25.9.	<input type="checkbox"/>	80 Kč	
ubytování v so 25.9. v pokoji	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 280 Kč*)	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 310 Kč	1lůžkovém <input type="checkbox"/> 350 Kč
snídaně v ne 26.9.	<input type="checkbox"/>	40 Kč	
oběd v ne 26.9.	<input type="checkbox"/>	110 Kč	
členský příspěvek ČES na rok 2011		Kč	
dobrovolný příspěvek pro ČES		Kč	

Vzhledem ke státnímu svátku v úterý 28. září nabízíme účastníkům konference **prodloužení pobytu a využití dvou volných dnů** k procházkám do okolí krásného lázeňského města Poděbrady a dalšímu společnému programu.

K uvedené přihlášce na konferenci ČES Poděbrady 2010 přiojednávám následující:

večeře v ne 26.9.	<input type="checkbox"/>	80 Kč	
ubytování v ne 26.9. v pokoji	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 280 Kč*)	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 310 Kč	1lůžkovém <input type="checkbox"/> 350 Kč
snídaně v po 27.9.	<input type="checkbox"/>	40 Kč	
oběd v po 27.9.	<input type="checkbox"/>	110 Kč	
večeře v po 27.9.	<input type="checkbox"/>	80 Kč	
ubytování v po 27.9. v pokoji	3lůžkovém <input type="checkbox"/> 280 Kč*)	2lůžkovém <input type="checkbox"/> 310 Kč	1lůžkovém <input type="checkbox"/> 350 Kč
snídaně v út 28.9.	<input type="checkbox"/>	40 Kč	
oběd v út 28.9.	<input type="checkbox"/>	110 Kč	

Platbu uhradte do 20.8.2010 na účet číslo **195 230 825 / 0300** a jako variabilní symbol uveďte **xxxxx10012**, kde za xxxxx doplní členové ČES číslo legitimace (bez úvodního písmene kategorie) a ostatní doplní číslo popisné uvedené v adrese účastníka.

navýšení účastnického poplatku při platbě od 20.8.do 20.9. 2010	<input type="checkbox"/> 100 Kč
zvýšení účastnického poplatku po 20.9.2010 a při platbě na místě (platba na místě možná pouze při volné kapacitě)	<input type="checkbox"/> 200 Kč
Celkem k úhradě	
Kč	

Platba byla provedena dne **2010** v hotovosti poštovní složenkou nebo bezhotovostně z účtu č..... /
Uvedení data platby a případně čísla účtu nám umožní lépe spárovat platbu s přihláškou.

V dne 2010 _____
podpis

Vyplněnou přihlášku zašlete na adresu: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10,290 01 Poděbrady nebo e-mailem: cea.polnicky@quick.cz

Vzhledem k rezervaci ubytování a stravování jsme nuceni účtovat v případě zrušení přihlášky následující **storno poplatek**:

- při odhlášení do 20.8.2010 včetně 50 Kč
- při odhlášení po 20.8.2010 100 Kč

*) cena 280.- Kč platí pouze při obsazení celého 3lůžkového pokoje a lze ji garantovat pouze pokud se tři účastníci domluví předem a obsadí celý pokoj!!

Vaše dotazy, náměty k činnosti ČES, které byste chtěli na konferenci řešit:

.....

.....

.....

Závazně objednávám následující **knihy, které odeberu a uhradím** v průběhu konference v Poděbradech (seznam a ceny knih viz Starto):

.....

.....